# TEA-BULTENO

**15ª JARO** **JULIO - AÚGUSTO 2012** **NUMEROJ 7-8**


Al tiaj ideoj, kiuj al la samtempuloj ŝajnas senenhava fantazio kaj al la posteuloj ŝajnas natura afero apartenas ankaŭ la ideo de enkonduko de komuna lingvo inter diversaj popoloj.
*Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917)*

## Ողջույն, թանկագին ընթերցող[(1)]!

Valizo plenigita, flugbileto enmane, pasporto enpoŝe, menso libera preta por novaj malkovroj, por unikaj esploroj. Al kiu lando ĉifoje Esperanto alkondukos min? Mallonge: al Armenio!

Al lando situanta inter oriento kaj okcidento, al lando historia kaj arta, al lando nomata 'subĉiela muzeo', al lando kie gastamaj esperantistoj estas preparantaj por mi (sed ne nur por mi!) eksterordinaran programon! En la gvidlibro estas skribite, ke la brita poeto George Byron tiel sin esprimis rilate al Armenio: "Ne ekzistas alia lando en la mondo tiom plena de mirindaĵoj kiel la tero de armenoj!" Kaj tiu eldiro eĉ pli min konvinkas pri praveco de mia elekto.

Enaviiĝo, de Venecio al Parizo, de tie ĉi al Erevano. Ne tro laciga la vojaĝo; nur iom da hasto premas min, kiam de la alto altiras atenton vidaĵo de verdaj arbaroj, de serpentumantaj riveroj, de montoj, kies kelkaj pintoj estas neĝokovritaj (ho, tiu altega, impona estas Ararato! Ĉu videblas la arkeo de Noa!?!), kaj fine, dense loĝata vastejo: Erevano! Do, kie mi estas? Kio atendos min? Kial fine elekti tiun foran landon, pri kiu tro malmulte mi scias? Nu, ne plu eblas surtreti proprajn paŝojn, mi plue iru renkonte al ARMENIO!

En tute moderna flughaveno, ĉe giĉetoj por akiri vizon, rapide solviĝas ĉia burokrataĵo, kaj ... jen en la sekva halo amike ridetanta vizaĝo: temas pri Susanna Baghdasaryan, la organizantino de Internacia Esperanto-Semajno-2. Ankaŭ mi ridetas, nun ĉiuj duboj estas for: jen mi estas en Armenio kaj en Armenio estas esperantistoj, kaj ĉie kie oni parolas Esperante, oni estas proprahejme! Vivu Esperanto!

Kaj, ekde Erevano, komenciĝas freneza galopado tra tiu lando, kies historio - iom post iom, piedpinte - penetras profunde en menson kaj koron. Ne temas pri abrupta, senhalta lavango da informoj, ke, se tiel, ĝi surverŝiĝus inunde, sen lasi ian spuron: ne, ĉio eliĝas malrapide, prookaze, stimulita de ies scivolemo, provokita de ia ŝajna scio, kiu tuj poste riveliĝas bedaŭrinda antaŭjuĝo, absoluta malkono de realo. Esperanto ludas perfekte sian rolon de interkomprenigilo, precipe kiam "homoj kun homoj" renkontas unu la alian kaj, ankaŭ ĉi tie en Armenio, tre bone funkcias. Samtempe kun malkovro de fortikaĵoj, monaĥejoj, urboj, urbetoj, vilaĝoj, montaraj pejzaĝoj ekas la malkovro de armenaj kulturo, historio, gento. Per neniu libro eblas pli bone kaj komplete esti informataj pri vivkondiĉoj, kutimoj, moroj de popolo, ol per aŭskultado senpera de tiu kiu vivas en la koncerna lando. Demandoj ĉiam ricevas sinceran kaj elĉerpan respondon, plurfoje la prezento de foraj aŭ nunaj eventoj estas emocia kaj emociiga kaj tuŝas la plej sentemajn kordojn de onia koro. Komunikemo kaj malfermiteco, spontaneco kaj varmeco, preteco akcepti diversecon, por esti mem pli ĝustasence komprenataj, jen kelkaj trajtoj komunaj al ĉiuj armenoj, ne nur la esperantistaj.

La originoj de armenoj perdiĝas en la nokto de l' tempoj. Laŭ la Biblio, armenoj estas la idoj de Hayk, pra-pra-nepo de Noa, kies arkeo kuŝis sur Monto Ararato post la universala diluvo. Unuafoje Armenion mencias grekaj aŭtoroj en la 6-a jc aK. Antaŭa citaĵo, datiĝanta je 859 aK, troviĝas en asiraj kojnoformaj skribaĵoj. La historio de tiu ĉi lando plenas je oftaj bataloj kontraŭ persoj kaj mediteraneaj landoj cele konservadon de propra teritorio. Plej grandan ekspansion Armenio akiras en la 1-a jc aK, kiam al ĝi apartenis landoj kiel la nunaj Libano, Sirio kaj Azerbajĝano. Du gravegaj etapoj, kontribuintaj al plifortigo de la nacia unueco, signas ĝian historion: la adopto de Kristanismo kiel ŝtata religio (301 pK) kaj la revolucia armena alfabeto, kreita en 405 de Mesrop Mashtots, kies 36 literoj funkcias ankaŭ kiel numeroj. Daŭre, en la paso de jaroj kaj jarcentoj, maltrankvila kaj malstabila estas la situacio en tiu lando: ĝi suferas pro atakoj kaj sekvaj, plurfojaj en diversaj periodoj, konkeroj fare de turkoj, de Bizanca imperio, invadoj de mongoloj kaj persoj, tiel ke jam en la 17-a jc komenciĝas la elmigradoj de armenoj al foraj landoj. Sed la plej tragika travivaĵo de tiu fiera kaj batalema popolo kulminas en la genocido plenumita de la turka regantaro (1915). Tio ne sufiĉas: tre turmentoplena estas la posta periodo, pro militoj, teritoriaj konfliktoj, malsanoj kaj malsato. Fine, en 1991, Armenio iĝas oficiale sendependa respubliko, sed paco ankoraŭ ne regas, pro alia milito en Nagorno-Karabaĥo, cele ties aneksadon. La milito daŭras ĝis 1994, sed ne definitive solvita estas la problemo: rilatoj kun Azerbajĝano daŭre estas komplikaj kaj streĉitaj. Jen eta, tre konciza historio de

Armenio, por konatiĝi kun ĝi, eĉ se nur tre, tre supraĵe.

Fortan, kortuŝan impreson mi ricevas dum vizitoj de preĝejoj. Je eniro, kaptas la atenton la internaj strukturo, ĝenerale krucforma, kaj la etoso: grandaj ŝtonoj, ĉefe el tofo, konsistigas la murojn, nigrigitajn de, dum jarcentoj bruletantaj, kandeloj; sur ili pendas pentritaj bildoj, foje naivaj sed ĉiam artismaj, de Di-patrino kun infano kaj de Sanktuloj; "teraso" kun ĉeflankaj ŝtuparoj sur kiu staras altaro, dividas la ceremonian parton disde tiu publika. Malhelo ene, sed inspira, ne timiga. Viroj, virinoj, knaboj, infanoj preĝas, ekbrulas kandelojn, krucosignas unu, du, tri fojojn, respektoplene - je eliro - neniam la dorson montras al la altaro. Klare percepteblas ilia profunda religiemo kaj mi ne kuraĝas eĉ unu vorton diri, por ne ĝeni ilian preĝadon. En tiuj grandkupolaj sanktaj ejoj mi sentas min pli proksima al Dio, kaj el buŝo, preskaŭ senaverte, eliĝas mallaŭta religia kanteto, memoro el miaj junaj tempoj, kiam pli ofte mi vizitadis preĝejojn. Ekstere, ĉirkaŭe, tie kaj tie aroj da "*khatchkar*", kutime el tofo brun-ruĝa, alifoje griza. Kio estas "*khatchkar*"? La nomo signifas "ŝtonkruco"-n: temas pri gravurita ŝtono, kies plej ofta figuro sur ĝi aperanta estas kruco. Pli sube, ĉizitaj estas diversignifaj simboloj, kiaj suno, folioj, la vivo-arbo aŭ figuroj de sanktuloj aŭ abstraktaĵoj. *Khatchkar* ekaperis en la 9-a jc, kvankam ekzistas ankaŭ el pli frua tempo, sed ne tiel arte gravuritaj. Ĉiu ŝtonkruco malsimilas unu al alia, tial ke antaŭ ĝi oni emas halti longatempe por admiri la delikatajn "puntojn" skulptitajn.

Preĝejoj, monaĥejoj, fortikaĵoj estas ĉirkaŭataj de mirinda naturo. Plej ofte ili kronas la montetajn pintojn, atestante tiel la bezonon, dum jarcentoj kaj jarcentoj, sindefendi de malamikoj. De tiu alto la rigardo flugas foren al senlima horizonto kaj, tie kaj tie, paŭzas sur rokaj montoj, por admiri ties nekredeblajn kolorojn. La ŝtonoj paradas preskaŭ ĉiujn kolorojn de la ĉielarko, en plej diversaj nuancoj, ekde la plej delikataj ĝis plej brilaj: de flaveto al plej intensa ruĝo, de blanko punktita per vitreca nigro al grizo, al preskaŭ smeralda verdo. La intenseco de tiuj koloroj donas grandan emocion: la tuto ŝajnas paletro sur kiu peniko en mano dia miksis la diversajn farbojn per hazardaj peniktuŝoj.

Kaj kion rakonti pri la ĉefurbo, pri Erevano? Moderna urbo, viva, movo- kaj evento-plena, sur kiu imponas, videbla dum mildaj tagoj de iu ajn urba parto, Ararato, la koro de Armenio. Komence de la 20-a jc la poeto Yeghishe Charents diris: "Eĉ se vi trairos la tutan mondon, nenie vi trovos monton similan al ĝi!" La historia monto aperas en la urboŝildo, kvankam ĝi ne plu apartenas al Armenio. En la centra urboparto luksaj vendejoj de la plej renomaj markoj (multegaj italaj!), aleoj vastaj, irataj de rapide trafikantaj aŭtomobiloj, ampleksaj verdaj parkoj kie troveblas aroj da kafejoj, ĉe kiuj ripozi, babili, trinki armenan kafon, ĝui la freŝecon de la altaj arboj, kaj, en la kerno de la urbo, placo de Respubliko, kie la stalinisma stilo renkontas la armenan arkiteturon reprezentatan en la severaj, fortikaj sed elegantaj konstruaĵoj, flav- kaj brunet-koloraj, kiuj alrigardas grandiozan fontanon. Vespere tie prezentiĝas mirinda spektaklo: akompane de muziko, klasika aŭ moderna, la ŝprucanta akvo dancas per sinuaj kaj zigzagaj movoj en eksplodado de koloroj. Senpaga spektaklo por doni iom da freŝo kaj ĝuo al la civitanaro, krom kompreneble al turistoj. Mirigas ankaŭ la granda kvanto da monumentoj, precipe statuoj de la plej gravaj, signifaj personoj de Armenio. La skulptaĵoj estas kelkmetraj aŭ je homa grando, el diversaj materialoj: kio plej trafas, almenaŭ miaopinie, estas la viveco de la vizaĝoj, rezulto de arta, lerte esprimita sentemo.

Konatiĝo kun nova lando kaj ties kulturo inkluzivas ankaŭ konatiĝon kun loka kuirarto, kaj tio ne lasas min tute indiferenta. Fakte ne eblas resti indiferenta antaŭ tiom da frandaĵoj, kiaj *khoravats*, *dolma*, *bourek*, *khachapuri*, *baklava* kaj *lavash*. Nur pri ĉi lasta mi rakontas: por ekscii pri la aliaj bongustaĵoj, mi invitas vin ĉeesti la projekciadon de la fotoj pri Armenio, en venontaj monatoj. Nu, kio estas *lavash*? Maldika platpano, bakita en ia speciala argila, enterigita, forno, kies nomo estas *tonir*. Lavaŝo servas kiel telero, kiel kaserolo, kiel ia speco de omleto, tamen ĝi estas farita per nuraj faruno, akvo kaj salo. Frandaĵo, kredu min! Kaj mi ne parolu pri legomoj kaj fruktoj! Forgesitan guston mi retrovas manĝante melongenojn, kukumojn, tomatojn: ja, por retrovi tiajn gustojn, mi devas retroiri en la tempo, antaŭ - pli-malpli - 50 jaroj. Tomato, karna, ruĝega, suka, dolĉa - kia miraklo de la naturo! Kaj la fruktoj? Persikoj flavaj kaj blank-ruĝetaj, pometoj verdaj, ĉerizoj flavaj, ruĝaj, nigraj - kiaj delikataĵoj! La aprikotoj estas la triumfo de la bona gusto. Prave, tiu frukto estas tiel amata de armenoj, ke al ĝi omaĝas eĉ la ĉiujara Filmo-Festivalo en Erevano, nomita: Ora Aprikoto Filmo-Festivalo. Dum la malferma ceremonio oni eĉ benas korbon da aprikotoj. La sekreto de tiu miraklo? Suno, akvo kaj NENIA KEMIAĴO, nur naturaĵoj, kaj amema zorgado flanke de la kamparanoj.

Kaj parolante pri mirakloj, antaŭ ol fini ĉi raporteton, mi montras al vi foton, faritan je mia foriro, en la flughaveno de Erevano. Ĉu ne miriga??? La kafejestro regalis nin eĉ per lasta (por ni!) armena kafo!




Multo ankoraŭ direndus, precipe pri la armenoj, pri la loka esperantistaro, pri la vivmaniero, pri la religio, sed ne facilas surpaperigi tiom da impresoj kaj spertoj. Mi esperas, ke ĉi skribaĵeto vekis vian scivolemon kaj instigos vin ĉeesti venontjare

**Daŭrigo je pĝ 3ª**

## Sur la breto



Aperis la esperanta versio de la poemaro "Kantoj", de la itala poeto Giacomo Leopardi (1798-1837), tra la traduko de Nicolino Rossi. Eldonis, aŭspiciis kaj patronas Napola Esperanto-Asocio.

Jen ĉi sube ekzemplo, unu el la plej signifoplenaj lirikoj de Leopardi, en itala kaj esperanta lingvoj:

### L'infinito

Sempre caro mi fu quest'ermo colle,
e questa siepe, che da tanta parte
dell'ultimo orizzonte il guardo esclude.
Ma sedendo e mirando, interminati
spazi di là da quella, e sovrumani
silenzi, e profondissima quïete
io nel pensier mi fingo, ove per poco
il cor non si spaura. E come il vento
odo stormir tra queste piante, io quello
infinito silenzio a questa voce
vo comparando: e mi sovvien l'eterno,
e le morte stagioni, e la presente
e viva, e il suon di lei. Così tra questa
immensità s'annega il pensier mio:
e il naufragar m'è dolce in questo mare.

### La infinito


Ĉiam karis al mi ĉi mont' ermita,
kaj tiu heĝo, kiu egan parton
de l' fora horizont' al vido baras.
Sed side prigvatante, vastsenliman
spacon preter ĉi tiu, kaj arkanajn
silentojn, kaj kvieton profundegan
mi ĉe la pens' imagas; ke apenaŭ
la koro ne ektimas. Kaj se l' venton
mi aŭdas flustri tra l' branĉar', mi tiun
infinitan silenton al ĉi voĉo
prikomparas; kaj pensas pri l' eterno,
kaj pri l' mortaj epokoj, kaj la nuna
kaj viva, kaj son' ĝia. Jen tra tiu
ĉi senlimec' fordronas penso mia
kaj ŝipperei dolĉas en ĉi maro.

---

Rolando Editore, 2012, Napoli; libroformato 17x24 cm; 214 pĝ. Prezo: € 15,00. Mendebla ĉe Napola Esperanto-Asocio (Via Pietro Castellino, 115 - 80131 Napoli, Italio). Triona rabato al esperantistaj institucioj kaj revendistoj.

Retpoŝto: nicolino.rossi@esperantanapolo.info

## Dimanĉon la 9ªn de septembro 2012
## Festo de Amikeco sur Monto Forno



Sur la Trilanda Pinto - Dreiländereck, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj el Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendevuo ĉe la simbolo ekde la 12ª horo. Tie Martin Stuppnig bonvenigos nin ĉiujn!

## *Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!*

Dum sur plaĝo ĉemara aŭ en freŝa montara herbejo vi ĝuas la merititan litertempon, klopodu respondi al jenaj demandoj rilataj al via urbo Trieŝto. Ne tuj iru al 6-a paĝo, por legi la respondojn: iom fosu en via memorujo!

1) Kian specifaĵon, unikan en la mondo, havas la "Tramo de Opĉina"?
2) Al kiu estas dediĉita la obelisko starigita ĉe la samnoma haltejo de la Tramo de Opĉina, en elstara panorama pozicio kaj ekirpunkto de unu el la plej fascinaj padoj de triesta karsto?
3) Kiun vi renkontas, irante al Placo *Unità d'Italia* (Unuiĝo de Italio), laŭ la dekstra trotuaro, sur la ponto de la Granda Kanalo?
4) Kiun vinon James Joyce kaj lia triesta amiko Diego de Tuoni ŝatis drinki en tavernoj?
5) Kiu estis la vera nomo de la triesta verkisto Italo Svevo?

---

Solvo de la kviza proverbo de Viglo, aperinta en la marta-aprila bulteno: ĝi tre simplas (ho, ĉu envere?!?)! Ĉiu vorto estis renversita!

**R O P O T N I Ĝ I M A N E D A D G A B E**
**N S A T S E A M I S K O R P L A M**

Por enamiĝinto Bagdad ne estas malproksima.


Estis konkursinto kiu prezentis sian solvon, kaj pro tio gratulindas pro la sufiĉa malfacilo de ĉifoja kvizo de Viglo, sed la respondo ne estis entute ĝusta. Do, premio al neniu sed ... ĝis la venonta Vigla cerbumilo!!!

---

**Atingis ĉi redakcion**
**jenaj petoj pri korespondado:**

feliĉigu almenaŭ unu el la ĉi-sube enlistigitaj knaboj per sendo de poŝtkarto aŭ letero!

Walter Cardenaz Rodriguez - 18-jara knabo
Fincas "LAS CASIMBAS"
Santo Domingo - VILLA CLARA
Kubo-53000



Luis Angel Martinez - 19-jara knabo
Calle 2da # 13
Finca Santa Olaya
Santo Domingo-VILLA CLARA - Kubo-53000

Yosdani Benitez Monteagudo - 18-jara knabo
Finca "DOS HERMANOS"
Carretera Maleza - Encrucijada
VILLA CLARA - Kubo-52400

---

en la IES-3, okazonta samperiode en Erevano: vi ne pentos, estu certa. Ĉar tie atendos vin, por vizitigi al vi "preskaŭ" la tutan Armenion kaj por havi la plezuron interkonatiĝi kaj interkompreniĝi pere de nia kara ILo, kun Susanna, Hrant, Lusine, Lida kaj Araksja, Knarik kaj Lilith, Levon, Rita, Meri kaj Hovhannes, Roza, Nina, Gajane kaj ankoraŭ multaj, multaj aliaj, kiuj mirigos vin per siaj simpatio, entuziasmo, gastemo! *Barev dzez*!!! **Elda**

---

(1) - aŭ pli bone: *Voghgxujn, thankagin ənthercogh*! Tio signifas: Saluton, kara leganto!

# PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Jen la lasta listo de paronimoj de VIGLO, kiu aparte atentigas pri tri interesaj notoj.*

***Horto*** fruktejo
***Korto*** apuddoma ĉirkaŭbarita spaco

***Hoso*** fleksebla tubo
***Huzo*** *(Zo)* genro de fiŝoj (*Huso* el kondrosteoj)

***Hurlo*** lupobleko
***Kurlo*** *(Zo)* genro de birdoj (*Numenius* el karafriformaj)

***Ĥano*** suvereno de turkaj, tataraj k mongolaj triboj
***Kano*** *(Bo)* alta, fortiktrunka planto, bambuaspekta

***Ĥolero*** *(Me)* epidemia malsano
***Kolero*** forta agitiĝo

***Ĥoralo*** malrapida himno, unisone kantata
***Koralo*** *(Zo)* arbosimila skeleto de kolonioj de kniduloj

***Implici*** logike enteni sencon
***Impliki*** [1] malfaciligi movojn aŭ agadojn

***Imposto*** deviga kontribuo de regnanoj
***Impoŝto*** eltranĉita ŝtonego sur kiu kuŝas volboekstremaĵo; vitrita parto super pordo aŭ fenestro

***Incidi*** *(Fi)* trafi surfacon ĝin ne penetrante (pp lumradioj ktp)
***Inciti*** [2] eksciti ies koleron
***Instigi*** puŝi iun al ago

***Indekso*** indika tabelo de enhavo, de prezo; listo de libroj malpermesitaj
***Indico*** indikaĵo, duonpruvo; nombra cifero
***Indiko*** (duon)montro

***Indulgo*** pardonemo
***Indulgenco*** kondiĉa pekabsolvo

***Inici*** ensekretigi, enkonduki al scio (pp religio, sekto, scienco)
***Iniciati*** kiel unua instigi

***Inko*** kolora fluaĵo por skribi, presi
***Inkao*** titolo de la iama reĝo de Peruo; ano de la reĝa klano

***Intereso*** volonta atento pri io, eblo akiri utilon, profiton
***Interezo*** procentaĵo

***Iridio*** malmola metalo
***Irido*** genro de plurjaraj herboj (*Iris* el iridacoj)

***Iriso*** *(Me)* centra okulmembrano
***Irizo*** nuanco per ĉielarkaj koloroj

***Jaketo*** mallonga jako
***Jako*** ekstera vira vesto

***Ĵaketo*** speco de redingoto; virina vesto
***Ĵako*** metala kava stangeto, kutime uzata en telefonio ☞ŝtopilingo

***Jambo*** versero dusilaba
***Ĵamboreo*** internacia kunveno de skoltoj

***Juro*** leĝoscienco
***Ĵuro*** atesto je Dio ks
***Ĵurio*** aro de civitanoj elektitaj por verdikti

***Justeco*** morala virto
***Justico*** ŝtata organismo zorganta pri juĝaferoj

***Ĵaluzo*** suspektoplena maltrankvilo pri la fideleco
***Ĵaluzio*** fiksa aŭ movebla lignofermilo de fenestro

***Kaabo*** sanktejo en Mekko
***Kabo*** terkapo, terpinto
***Kab'o*** mezurunuo de kapacito

***Kadrato*** ilo por komposti en tipografio
***Kvadrato*** egallatera ortangula paralelogramo

***Kajto*** flugdrako
***Kajuto*** surŝipa ĉambreto

***Kaliko*** sankta trinkvazo; *(Bo)* la tuto de la eksteraj ĉirkaŭaj florfolioj
***Kalikoto*** speco de katuno

***Kalkano*** posta elstaraĵo de objekto; *(Me)* posta piedparto
***Kalkaneo*** *(Me)* kalkanosto
***Kalkanumo*** posta suba parto de ŝuo

***Kambio*** komerca, ĝirebla valorpapero
***Kambiumo*** *(Bo)* kreskanta histotavolo de tigo
***Kambrio*** la unua epoko de la paleozoika erao

***Kamelio*** *(Bo)* japana arbedo (*Camellia* el teacoj)
***Kamelo*** *(Zo)* unu- aŭ du-ĝiba remaĉanta mamulo

***Kamero*** malhela, senfenestra ĉambreto; parto de aparato
***Kamerao*** fotoaparato uzata en kinematografio

***Kanabeno*** *(Zo)* specio de karduelo (*Carduelis cannabina*)
***Kanabo*** *(Bo)* herbo uzata por teksaĵoj (*Cannabis*)

***Kanapo*** longa sofo kun apogiloj, por pluraj personoj
***Kanopo*** funebra vazo

***Kancero*** *(Me)* tumoro; *(Bo)* plantmalsano
***Kankro*** *(Zo)* dekpieda krustulo
***Karcero*** prizono, arestejo

***Kanoto*** promena boato
***Kanuo*** indiana kanoto el arboŝelo, pelata per pagajo; sporta kanoto

***Kantaro*** [3] kanto-kolekto; *(Zo)* genro de insektoj, el ordo de koleopteroj
***Kantarelo*** *(Bo)* g. *(Cantharellus)* de ombrelfungoj
***Kantarido*** *(Zo)* specio de insekto *(Lytta vesicatoria)*

[1] Atentu: male ol la itala, ***Impliki*** havas nur la signifon de *obstakli, bari, malhelpi* k ne *coinvolgere* (por kiu taŭgas ***kuntreni***) aŭ *comportare* (taŭgas ***implici***) eĉ se en la vortaro de Minnaja la senco estas iomete duba.
[3] Plie atentu: itallingve, la du verboj ***inciti*** k ***instigi*** tute interŝanĝas la sencon!!
[3] Malofta ekzemplo de "Homonimoj" en E-to.

# Esperantaĵoj

## Bicikla "Veturilo" en Varsovio

"Veturilo" - tiel nomiĝas la nova sistemo de urbaj bicikloj en Varsovio. La decido estis alprenita sekve de interreta voĉdonado. La nomo en Esperanto ricevis 32 procentojn da voĉoj. Laŭvice ricevis 26 procentojn la nomo "Wawabike", 12% "Ziuuu" kaj "Rowerynka". Sekvis "Bajker" (11%) kaj "Wabik" (6 12%). Post funkciigo de ĉiuj 125 luostacioj kun 2100 bicikloj, la varsovia sistemo estos la plej granda en tiu parto de Eŭropo. Ĝia uzado estos tre simpla: necesos nur registriĝo kaj antaŭpago. Prezoj por uzado de bicikloj ne estos altaj kaj favoros mallongajn vojaĝojn: 20-minuta luo estos senpaga, sekvaj 40 minutoj kostos nur unu zloton. Por la dua kaj tria horo necesos pagi respektive 3 kaj 5 zlotojn. Ĉiu plia horo kostos 7 zlotojn. *Informis: Łukasz Żebrowski*

## 10-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj Koprivnica, 22-24.06.2012




Dum la kongreso, kunlabore kun Filatelista societo de Koprivnica estis lanĉita filatela koverto, kaj la 23an de junio la Kroata poŝto uzis porokazan poŝtan stampon en sia oficejo en Koprivnica. Entute aperis 200 ekzempleroj. Unu el la ekskursaj celoj estis la vilaĝo Koprivnički Bregi, kie estis inaŭgurita nova ZEO: memortabulo al Ilija Puhalo (1899–1937) okaze de lia 75a mortodatreveno. Li estis unu el la ĉefaj figuroj de la fervojista Esperanto-movado kaj la persono kiu pleje aktivis por disvastigi Esperanton en la nordkroataj regionoj. La memortabulon kune malkovris Darko Sobota, la estro de la Komununa konsilio en Koprivnički, kaj Josip Pleadin, iniciatinto de la starigo de tiu tabulo, nome de Dokumenta Esperanto-Centro.

*Info: J. Pleadin*

## Jubilea individua poŝtmarko „Esperanto 125"




La 14an de januaro 2012 komenciĝis E-kurso en la „Sendependa privata lernejo San Min" en Teluk Intan, Perak, Malajzio. Temas pri lernejo por ĉina minoritato. Samtempe fondiĝis la „San Min Esperanto-Klubo". Gvidanto kaj kursestro estas Sim Teik Hooi. La 24an de julio ĉj. aperis serio kun kvar poŝtmarkoj sur unu el poŝtaj „bazfolioj" por individuaj pm-oj. *Fonto: „La Verda Lupeo" - Elf-Arek*

# Laste trovitaj!

Jen ankoraŭ unu karikatura Esperanto-Karto, de la desegnisto Jean-Robert, kiu ekde 1911, komisie de Alice-Leontine Farges, produktis ĝis ĉirkaŭ la 1920-aj jaroj. Ĉi-foje ni plikonatiĝos kun Theophile Cart, kies agado multon influis nian movadon.




Li naskiĝis en 1855 apud Dordogne kaj mortis, maje 1931, en Parizo. Cart studis en diversaj eŭropaj urboj, krom en Parizo: Bazelo, Berlino, Romo. Pro lia kono de sep lingvoj, la franca registaro sendis lin al Upsalo, ĉe kies universitato li instruis la francan beletristikon. En Parizo, post tiu sveda parentezo, li iĝis instruisto ĉe, interalie, la Lernejo de Politikaj Sciencoj. Li estis ankaŭ prezidanto de la Lingvistika Societo. Malgraŭ ke Cart estis ricevinta jam en 1894 gramatikon de Esperanto, li ĝin eklernis nur post legado de artikolo, el la plumo de Carlo Bourlet, aperinta en la organo de *Touring Club*, en 1901. Ekde tiam li iĝis plej fervora disvastiganto kaj instruanto de Esperanto. Krom multnombraj artikoloj kaj broŝuroj pri la lingvo, li skribis lernolibrojn kaj vortarojn, kiuj altiris la atenton de la tiama Esperanto-movado kaj iĝis klasikaj verkoj, ofte tradukitaj al aliaj lingvoj. Unue administranto de la Presa Esperantista-Societo(1) kaj poste ties direktoro, li dediĉis al tiu entrepreno ĉiujn siajn fortojn kaj energion, superante multegajn malfacilaĵojn. Sur la poŝtkarto aperas multaj akronimoj, el kio kompreneblas, ke li estis plene engaĝita en diversaj agadoj por-esperantaj: Prezidanto de la *Société pour la propagation de l' Espéranto*, prez. de la Akademio, direktoro de la Komisiono pri komuna vortaro, k.a. Krome li tre aktivis helpe al blinduloj, jam ekde 1903, ankaŭ per eldono de la brajla gazeto "Esperanta Ligilo".

Sed li ĉefe estis "**LA FUNDAMENTISTO**". Kiam aperis unu el la plej seriozaj minacoj, trafinta la esperantistaron, kiu timige endanĝerigis la pluan ekziston de la lingvo, nome la lingvo "Ido", li plej sindediĉe, plej persiste kaj insiste batalis kontraŭ ĝi. Nur lia, dujara, senhalta kaj streĉa klopodado sukcesis savi el kompleta ruiniĝo la Esperanto-movadon, kaj tio certe plu stimulis lin, kontraŭstari ĉian lingvo-reformemon, subtene de la principo ke Esperanto devas sekvi sian naturan evoluon. Eĉ kontraŭ la enkonduko de novaj vortoj li luktis, ne hezitante kritiki pro tio la tiutempajn gravajn verkistojn, kiaj Kabe, A. Grabwoski kaj eĉ Zamenhof mem! "Ni laboru, restante fidelaj al nia senŝanĝa Fundamento" estis lia devizo, kaj ĝis sia morto plenfidela al tiu ideo li restis!

---

***(1)** Unua Esperantista eldonejo, fondita en 1904, en Parizo, kiu transprenis la redaktadon de "Lingvo Internacia".*

*Fontoj: Vikipedio kaj Enciklopedio de Esperanto*

**Respondoj al demandoj pri Triesto (je 3ª pĝ):**

1) La tramo laŭriras vojon tre deklivan, kaj la veturilo, supreniranta, estas puŝata; se malsupreniranta, ĝi estas bremsata per speciala ŝnur-kabla sistemo.
2) Al Francisko Jozefo, Imperiestro de Aŭstrio (1830-1916).
3) La statuon de *James Joyce* (1882-1941), la faman irlandan verkiston kiu de tempo al tempo, komence de 1900ª jaro, restadis en Triesto, instruante ĉe la *Berlitz School*.
4) Temis pri "*Opollo*", blanka vino el la insulo *Lissa* (kroata insulo situanta vidalvide al *Split*, Dalmatio). Post kiam la verkisto estis jam sufiĉe ebria kaj ŝanceliĝema, li - inspiroplena - ekdeklamis la versaĵojn de la tre amata franca poeto *Paul-Marie Verlaine*.
5) Lia nomo estis *Aron Hector Schmitz*. La familio, hebrea, originas el Hungario kaj li elektis tiun pseŭdonimon omaĝe al siaj germana kaj itala kulturoj.

## *Iom da detaloj pri la tramo*

La tramo de Opicina, en triesta dialekto *el tram de Opcina,* estas unu el la turismaj allogaĵoj de Triesto: temas pri trama linio kunliganta la urbon, situantan je mara nivelo, kun la karsta altebenaĵo, kiu leviĝas ĝis alteco de 348 metroj s.m.n.

De la kaplinio en la centra placo *Oberdan*, post mallonga vojiro, la tramo komencas sian supreniron per kabla transportsistemo, laŭ kiu la trenmaŝinoj apogiĝas al du ŝirmilo-ĉaroj ligitaj al la ekstremoj de kablo kiu kuras centre de la reloj. La maksimuma deklivo egalas al 26% kaj, kiam ne plu bezonatas la ŝirmilo-ĉaroj, la motorvagono kuras laŭ 8-procenta deklivo, ĝis atingo de la vilaĝo *Villa Opicina*. Laŭlonge de la supreniro eblas spekti mirindajn panoramojn al la golfo kaj, ĉe diversaj haltejoj, ekas pluraj promenad-padoj.


Tiu linio, klasifikita kiel linio 2, estis inaŭgurita la 9ª de septembro 1902: tiam funkciis dentorela lokomotivo je elektra trenado kaj ĝi iris de Placo *Scorcola* ĝis *Vetta Scorcola*: la du-aksa trenmaŝino estis aŭstra produktaĵo. La irvojo longis iom pli ol 5 kilometrojn. La 26ª de aprilo 1928 la dentorela sistemo estis anstataŭita per tiu ŝnurtrena.

La nuntempe servantaj tramoj estas produktitaj de Mekanikaj Uzinoj *della Stanga* el Padovo: 5 veturiloj estis faritaj en 1935 kaj kromaj du en 1942: malgraŭ la "grandaĝo" ili estas en bonega stato kaj ilia karakterizo ĉiam estis kaj estos tiu blanka-lazura "vestaĵo" tipa de la urbaj tramoj.

La du ŝirmilo-ĉaroj aŭ puŝ-ĉaroj, kiuj ekfunkcias en la plej dekliva vojoparto, origine, en 1928, estis el ligno. En 1970 tiuj "pensiiĝis" kaj estis anstataŭitaj per pli fortikaj kaj oranĝkoloraj ĉaroj. Plej laste, ekde 2006, servadas novaj modeloj kiuj tute ne bezonas stiriston.

En placo *Scorcola* ekas la grimpado: tie la tramo apogiĝas sur la ĉaro, ligita al la trenŝnuro, kiu puŝas ĝin ĝis supero de la 26-procenta dekliveco. Samtempe, ĉe la pli supra stacio apud *Vetta Scorcola*, dua tramveturilo, apogita sur alia ŝirmilo-ĉaro, ligita ĉe la alia ŝnura kapo, estas akompanata malsupren. Duone de la vojo la du tramoj renkontiĝas. La tramo, direkta al *Opicina*, haltas ĉe Obelisko, situanta je 343 metroj smn. En 1830, la blankŝtona monumento estis starigita de la Triesta Komercista Korporacio, honore al la aŭstria imperiestro Francisko la Unua, veninta al nia urbo por inaŭguri la ekkonstruadon de la nova strato *Commerciale*.

Do, la linio ankoraŭ nun funkcias – eĉ se, iom ofte, malfunkcias pro akcidentoj, incidentoj, okazaĵoj, cirkonstancoj, malfeliĉoj, kontraŭecoj, neantaŭviditaĵoj, ktp ktp, kiel atestas la fama popola kanzono *'E anche el tram de Opcina xe nato disgrazià'* el 1906, en la suba traduko de *Anita Altherr*. Malgraŭ ĉio ĉi konsilindas eluzi unu horon de via tempo, por sperti ĉi tiun surmontan grimpadon pertraman: eltramiĝu ĉe Obelisko por admiri la urbon kaj eĉ Istrion aŭ Gradon, se vetero plej bonas, daŭrigu poste ĝis *Opicina* kie vi povos sensoifigi vin per bongusta loka vino kaj poste ree suben, al Triesto, per la sama tramo: nur atentu, kie vi sidos! Mi ne malkaŝas kial tiu ĉi konsilo!



De Opĉina la tramo ja
tragikas la destin',
descende preter Skorkola
al dom' frakasis sin.
Dankon al Dio, ke estis labor-tag',
ĉar nur la konduktoro
troviĝis en nia tram'.

Samkiel la '*bora'* blovanta senĉes',
blovanta senĉes',
ĉi belaj knabinoj sin movas senĝen',
sin movas sen ĝen'.
Fortas la bora en nia region',
ni foje supozas, ke krevas la mond'.

## *Ĉiam aktualas la proverboj de nia Majstro!*

Groŝon ŝtelis - ho, ŝtelisto! milojn ŝtelis - financisto.

Ŝteletiston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas.

**Fermo de la asocia sidejo:**
**julie kaj aŭguste!**
Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos
**vendrede la 7ª de septembro, je la 19ª h.**
Ĝis la revido je la 7ª de septembro:
ni atendas vin multnombraj!

Esperanto ĉe Alirprogramoj de RADIO UNO

la 20ª de aŭgusto, je ĉ. la 14h30


BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo**: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
**Grupa ttt-ejo**://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina - www.esperantotrieste.it
**Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
**Poŝtĉekkonto** Nº 10834349